

Amerika Esperantisto

JUNE, 1917



AMERIKA ESPERANTISTO

Official Organ

of

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Friday eve., Rm. 127 Lick Bldg., 35 Montgomery St., F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Ave.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo,—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Wednesday evenings. Address H. S. Lane, Sec'y, 1323 Oxford St.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 436 15th St.

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 8 P. M. R. Goodland, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

BUTTE, MONT.

Argentarka Esp. Rondo, kunvenas vendrede, 8.00 P. M. C. L. Williams, Sek., 311 E. Mercury St.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Fr. Kovarik, 2502 S. Kedzie Ave., Sek. La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island Ave. F-ino R. Votlučka, 1539 W. Jackson Blv., Sek. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

ROCKFORD, ILLS.

Skandinava Esperanto-Instituto, 417 7th St. Joseph Johnson, Sec'y, 2315 Parmelee St.

CINCINNATI, OHIO.

Cincinnati Esperanto Soc., 629 Vine Street. E. H. Becker, Sec., 511 Sycamore St.

DELPHOS, OHIO.

Delphos Esperanto Klubo, Carnegie Library; Meets every Tuesday. 7.30 P. M., A. J. Laudick, Sec'y.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3913 Sackett Ave.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg., Mrs. Wm. C. Tapley, Sec'y, 13 East Promenade.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esp. Unuiĝo, ĉiusemajne, Magnus Butzel Library, Harper & E. Grand Blvd.

La Septentrio, Tues., 8.00 P. M., 578 Alexandrine Ave., W.

HOUSTON, TEXAS.

Houston Esperanto Rondo, ĉiun mardon, 8.00 P. M., ĉe Y. M. C. A. S-ro A. F. Sundermeyer, Sek.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists, S-ino B. H. Kerner, Sek., 632 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P.M.

NEW YORK, N. Y.

Greater New York Esperanto Society. C. C. Coigne, Sec'y, 2633 Creston Ave. Tel. Fordham 2749.

NEW YORK (Manhattan) N. Y.

The New York Group, Wash. Irving H. S. Jos. Silbernik, Sec., 235 E. 18th St.

Germana Esperanto-Societo, 1966 Broadway, Rm. 27. Open every Wed. for information, 7-8 P. M.; Meetings and Classes, 8-9.30 P.M.

PHILADELPHIA, PA.

Phila Esp. Soc., J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Windsor Cafe, 1217 Filbert St.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art Wm. Smith, Sec., 7315 Greenwood St. Fridays, 8 P.M., Teachers' Rm., Carnegie Inst.

TILDEN, NEBR.

Esperanto-Fako de la Nebraska ŝtata Kristana Celada Unuiĝo. Estro, Pastro Chas. P. Lang, Tilden, Nebr.

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y, Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879,

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

WEST NEWTON, MASS.

ONE DOLLAR A YEAR Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50) SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukajoj kaj novaĵoj ĉiam prefere akceptitaj. Oni ne resendadas neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezono.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

VOL. 20

JUNE, 1917

No. 5



CONGRESS-PROPAGANDA NUMBER OF AMERIKA ESPERANTISTO

The July number of **Amerika Esperantisto**, which is already in press, will contain a full account of the Tenth at Philadelphia, which was one of the most successful ever held in this country. This will be an excellent propaganda number and we shall print a few hundred extra copies, which may be had in quantities of five or more at five cents each. Please send in your orders at once, so we can tell about how many extra to print. Paper is too expensive to waste any, but we want to be sure to have enough. **DO IT NOW.**

Angers, 24-VI, 1917.

Se okaze de la partopreno al la milito, Amerikaj Esperantistoj trapasos aŭ haltos en Angers, la Angers'aj Esperantistoj, malmultaj, sed fervoraj estos ĝojaj ilin kore akcepti.

Skribu aŭ: al Sekretario de Esperanta Grupo, Place des Halles, Ancienne Cour d'Apel, Angers, aŭ al S-ro Muffang, licea profesoro, 7 Rue du Fresne, Angers.

LA PLEJ JUNA ESPERANTISTO EN USONO

La multaj amikoj de gesinjoroj J. S. Horn, multe ŝatos sciigi ke en New Orleans, La., Usono, Aŭgusto la 15an, 1917, naskiĝis al ili fileto, Alvah Jordan Horn.

Ĉiu malnova Esperantisto memoros gesinjorojn Horn kiel la Esperantajn geedzigitajn ĉe la Naŭa Kongreso en Annapolis, kaj sinjorinon Horn kiel "IAM" de la Centra Oficejo de 1912 ĝis 1916.

Al gesinjoroj Horn kaj la novenaskiteto **Amerika Esperantisto** sendas korajn gratulojn.

IN THE PRESS SHRAPNEL

From "The Oil and Colour Trades Journal" of London, July 7, 1917

A paragraph appeared in this column on May 19, describing how an Englishman and a Russian, meeting in Paris, found that their only common language was German. An American subscriber points the moral of this illustrating the need of an international commercial language. He instances the fact that he recently found a knowledge of Esperanto particularly useful in transacting business in Argentina. This is a matter that will certainly have to be taken into account in the general tidying up and straightening out after the war, especially if it will enable us to escape the necessity of learning Russian, Japanese, and all the other tongues of our many Allies.

PASSED EXAMINATIONS

Supera

Mrs. Bessie Chollar King.
Miss Julia Adrienne Doe.
Both with honor.

Walter LaFary of Cincinnati is listed in the first draft for selective service in the U. S. Army.

An address given on May 27th at the Church of the Ascension in New York City on "The Religious Aspect of Esperanto," was published in "The Star of the West," in No. 7 issue for July 13th, and copies can be had by sending 10 cents to P. O. Box 283, Chicago, Ill.

BOOK REVIEW

Esperantaj Poemoj de C. Chr. Droogendijk, Stavenisse, Nederlando: a collection of 30 poems, mostly original. Since the author is a **sindonema samideano** (a number of his productions having **La Afero** for their theme and all being imbued with the spirit of Esperantism), it is with peculiar regret that we cannot recommend the booklet, either as poetry or as good Esperanto. The errors in language are not merely those of style which might be overlooked as "poetic license," but direct violations of

grammar and word-meaning: e.g., **komenci al** (?), frequent use of **al** for **en**, **fremdo** (?), **idilio**, (=paradizo ?), elision of accusative, **provi** for **pruvi**, **nescienco** (=nescio), **vundigi** (ig superfluous), **kiam** for **se**, **-is** for **-us**, etc. The poetic thought is high enough, but lacks originality of concept and of imagery, and is awkwardly expressed, e.g., particles like **ja**, **jen**, and the article thrown in as **metre**-ballast, while, on the other hand, there are ellipses of necessary words.

THE LATEST BOOK

—Brooklyn, N.Y.: "La libreton 'Kial Mi Scias ke la Mortintoj Revenas' de W. T. Stead, mi neniam vidis ĝis mi ricevis vian tradukon Esperantan. Sekve mi ne povas ĝin kompari kun la originalo. Mi legis la libreton kun egala intereso kaj profito. Ŝajnas al mi ke la aŭtoro prezentas faktojn esplorindajn kiuj forte inflos ĉiun veremulon kiu legis la libron kaj pripensas la aferon.

Permesu al mi gratuli vin ke vi faris tiel bonan, utilan laboron por nia kara lingvo." R.—. C.—.

—Boston, Mass.: "Please accept my sincere congratulations on the fine appearance and general excellence of your little book 'Kial Mi Scias ke la Mortintoj Revenas.' It is a worthy addition to the literature of Esperanto. A very wonderful work, and I heartily congratulate you. I have read it with sincere admiration.

E.—. P.—.

Above are quoted extracts from letters which well indicate the favor with which this work has been received. Briefly, it can be stated that here are presented the wonderful personal experiences of W. T. Stead, famous editor, benefactor and Esperantist, in investigating the truths demonstrated by psychical research. It is readable and interesting as any novel.

Sent post free, upon receipt of 45 cents, by F. M. Goodhue, Boston Esperanto Society, Pierce Building, Boston, Mass.

—Advt.

A full review of this book will shortly appear in this column.

LA TREZORO

Lehman Wendell

Estas certaj temoj kiuj havas profundan intereson por ĉiuj, sed kiujn la verkisto devas ordinarie eviti, se li ne volas esti rigardata kiel mensogulo. Unu el tiuj ĉi temoj rilatas al kaŝitaj trezoroj, kaj apenaŭ pasas tago en kiu iu aŭ alia ĵurnalo ne parolas pri nove organizita ekspedicio, kiu celas trovi trezoron perditan en nekonata angulo de la mondo.

Mi hezitas prezenti mian propran strangan rakonton, ĉar mi estas viro sentema kaj ne povas toleri mokadon; sed certaj amikoj, kiuj montras grandan intereson en ĉiuj aferoj rilatantaj al la regiono kiun mi vizitis kaj al mia stranga aventuro tie, insiste urĝas ke mi donu la faktojn al la publiko. Unu el tiuj ĉi amikoj, konata ĵurnalisto, forte konsilas ke mi tuj preparu plenan raporton pri ĉio kion mi vidis kaj spertis, kaj konfidu al la sagaceco kaj prudenteco de la publiko,—kaj li insistas ke eĉ se mia skribajo estus malbone verkita, ĝia malboneco donos al la rakonto pli bonan ŝancon esti akceptota kiel veraĵo. Precipe pro liaj konsiloj mi prezentas mian rakonton.

Antaŭ kelkaj jaroj, veturante en okcidenta Usono, en ŝtato Vaŝingtono, mi vidis por la unua fojo la altan monton, kiujn la geografiistoj nomas Ranier (Rener), sed kiun la Indianoj nomas Tacoma (Takoma). Ĝi estas unu el la plej altaj montoj, se mi ne eraras, en tuta Usono, havante alton de 14,555 futoj. Ĝi estas sen dubo la plej belega monto en Usono, se oni akceptas la vortojn de kompetentuloj, ĉar famaj Eŭropaj montistoj trovas ĝin egala, laŭ multaj rilatoj, je la Alpoj.

Mi pasigis multajn vesperojn sur la verando de mia hotelo admirante la malproksiman monton kaj kun intereso aŭskultante al strangaj legendoj pri ĝi. Tiuj ĉi legendoj estis senescepte tute nekredindaj, kaj tamen unu el ili faris tiel grandan impreson ĉe mi, ke, vole nevole, mi ne povis ĝin forigi el mia menso. Laŭ tiu ĉi legendo la ĉefo de malnova indiana gento kaŝis, antaŭ multaj multaj jaroj, en profunda subtera kavo sur la suda flanko de la monto, milion da alkcentoj. Tie ĉi mi devas flankeniri

momenton por klarigi al la leganto ke en ĉiu viralko sin trovas du grandaj vangdentoj, kiuj estas multe ŝatataj de Usonanoj, kaj kiuj pro malfacileco akiri jam havas tiel altan valoron ke unu sola dento vendiĝas kontraŭ dek dolaroj. Oni vidas do ke la trezoro havis proksimuman valoron de 10,000 dolaroj.

Laŭ la legendo multaj homoj jam perdiĝis serĉante la trezoron. Iuj el ili mortiĝis pro la teruraj neĝblovegoj kiuj subite venas sur la monto; aliaj dezirante serĉi la trezoron sekrete kaj sen gvidistoj, perdis la vojon kaj neniam plu revenis; aliaj revenis kun plej strangaj rakontoj pri suferado, pri maljuna Indiano kaj pri mirindaj alkcentoj.

Tiaj rakontoj povis havi nur unu efekton sur min; ju pli mi pensis pri la afero des pli forta fariĝis mia deziro mem viziti la monton kaj serĉi la trezoron, kaj unu tagon, ne plu povante kontraŭstari la deziron, mi min ekipis por la grimpado, aĉetis fervojbileton kaj ekveturis.

Pri mia veturado al la monto, pri la mirinda pejzaĝo, kiu ĉiuhore aliformiĝis antaŭ miaj okuloj, kaj pri la densaj vastegaj arbaroj kiujn mi traveturis, mi tie ĉi ne bezonas paroli; tio estas alia historio. Sufiĉas diri ke je la vespero mi jam trovis min ĉe la neĝlimo. Tie estis starigitaj, por la utilo de turistoj, ĉirkaŭ kvindek tendoj en kies mezo troviĝis granda tendo kiu utilis por restoracio.

Ĉe la tendaro, kiel kutime, estis turistoj el ĉiuj partoj de Usono, kiel ankaŭ el Eŭropo. Altkreskaj harditaj gvidistoj paradis antaŭ la admirantaj turistoj, aŭ sin preparis por morgaŭa grimpado.

Mi kiel eble plej multe evitis ĉiujn homojn, ĉar mi timis ke eble ili divenus mian intencon kaj mokus min. Mi tial restis en mia tendo kaj frue enlitiĝis. Morgaŭe jam antaŭ sunleviĝo, kaj dum la aliaj dormis, mi min vestis kaj kviete glitis el la tendo.

La grimpado estis hazarda. Vastegaj neĝkampoj etendiĝis en ĉiu direkto, kaj tiel glata estis la glacia neĝo ke per granda penado kaj malfacileco mi iris antaŭen. Mi estis kiel eble plej singarda, ĉar mi bone komprenis la danĝeron kiu konstante minacas montanojn. Ne malofte nesperta turistoj glitfalas sur la monta deklivo kaj rapide glitas malsupren, sin mortfrapante kontraŭ rokoj

ĉe la piedo de la deklivo.

Post trihora grimpado, kiam mi jam estis ĉirkaŭ 10,000 futojn super la nivelo de la maro, densaj nigraj nuboj komencis amasiĝi ĉirkaŭ la monto, la suno iom post iom kovriĝis kaj la aero rapide fariĝis mordante malvarmega. Kaj tiam, sen eĉ la plej malgranda averto, unu el tiuj teruraj neĝblovegoj kiujn la gvidistoj ĉiam timas, venis, kaj per tuta mia povo mi devis batali kontraŭ la ventego por ke mi ne estu malsuprenjetata laŭ la glacia krutajo. Tro malfrue mi vidis mian malsaĝecon, kaj nun unu sola celo pelis min antaŭen — la espero trovi rifuĝejon.

Tiel mi batalis antaŭen en vera abismo de malespero ĝis subite mi staris antaŭ grandega roko en kies flanko mi trovis kreviĝon sufiĉe vastan por ke oni povu eniri. Tion mi faris sen momenta hezito kaj je mia granda miro trovis min en unu el tiuj mirindaj glacikavoj, kiuj sin trovas en multaj lokoj sur la monto.

La glacikavo estis bone ŝirmita kontraŭ la ventego kaj la temperaturo estis sufiĉe alta por ke mi estu almenaŭ iomete komforta. La kavoj konsistis el unu ĉefa ĉambro kaj kelkaj pli malgrandaj ĉambroj, kies muroj brilis je delikataj bluaj kaj verdaj koloroj. La plej malgranda ĉambro finiĝis en tunelo, kiu ŝajnis etendi rekte en la monton.

Mi iris al la tunelo kaj kun granda intereso kaj scivolo enrigardis. En tiu sama momento mi aŭdis nelaŭtan ekridon, tiel strangan kaj teruran ke forta ekstremo trakuris mian korpon de kapo ĝis piedoj, kaj mi kvazaŭ ŝtoniĝis. Alia teruriga ekrido kaj mi vidis konfuze, kvazaŭ sonĝe, malbelgan kurbiĝintan Indianon kiu per sia osteca montrafringro signis al mi sekvi. Samtempe li malaperis en la tunelon.

Mi volis forkuri sed ŝajnis ke mi estas sub la influo de mistera povo kiun mi ne povas kontraŭstari, kaj mi eniris la tunelon por sekvi la maljunulon.

Unue mi nenion povis vidi — ĉio estis nigra — sed iom post iom mi kutimiĝis al la malheleco, kaj mi vidis ke la tunelo estas lumigata per mistera lumo kies originon mi ne povis diveni. La Indiano ne plu vidiĝis. La atmosfero estis varma kaj malseka, kaj konstanta gutado de akvo venis el la muroj. Pri tio mi ne miris ĉar mi sciis ke en pratempoj la monto estis vul-

kano, kaj ankoraŭ ĝi havis internan varmon sufiĉe altan por fluidigi la glacieron.

Dum mi iris antaŭen la atmosfero fariĝis ĉiam pli varma kaj malseka; strangaj vegetaĵoj kreskis sur la muroj de la tunelo, kaj grandaj lazertoj kaj ranoj rampis antaŭ miaj piedoj.

Fine en la tunelo mi vidis subitan kurbiĝon kaj trovis min en granda hele lumigita kvadrata ĉambro. Mi konjektis ke la stranga lumo havis sian originon en la putrantaj vegetaĵoj kiuj pendis de la muroj, sed tio estas nur supozo kaj eble mi eraras.

En la centro de la ĉambro, sur kvadrata roko, staris granda plektita indiana korbo, kaj la sama mistera povo kiu igis min sekvi la fantoman Indianon nun tiris min al la korbo.

Mi trovis ĝin superplena je alkden-
toj de la plej alta kvalito. Ili tiel plaĉis al mi ke mi prenis tutan manplenen por pli bone observi ilin. Apenaŭ mi tuŝis la trezoron, staris antaŭ mi, kiel vivanta skeleto, la maljuna Indiano kun malinda grimaco sur la sulkigita vizaĝo. Tiam alia nelaŭta ekrido, kiu strange eĥis en la malplena ĉambro. Mi rigardis la maljunulon momenton, miaj kruroj kvazaŭ lamiĝis, tiam ĉio nigriĝis kaj mi svenis.

Kiel longe mi estis senkonscia mi ne povas diri. Kiam mi fine vekigis mi trovis min en hospitalo en urbo Tacoma. Ĉe la lito staris du kuracistoj kaj flegistino, kaj ili nelaŭte parolis inter si. "Li havas fortan febron," diris la ĉefkuracisto al la alia. "Jes, pri tio mi ne miras," respondis la alia, "sed unu afero estas stranga. La flegistino raportas ke dum tri tagoj li deliris kaj en sia deliro li senĉese parolis pri mirindaj alkden-
toj kaj pri malbela Indiano. Mi ne povas kompreni." "Facile klarigebla," respondis la alia, "tre facile. Li sendube ĉasis alkon en la tago kiam la gvidistoj trovis lin senkonscia sur la monto, kaj pro tio ke alkden-
toj estas tiel ŝataj de ni Usonanoj, kaj Indianoj tiel impresas orient-Usonanojn estas tute nature ke li parolas pri tiuj aferoj en sia deliro."

La voĉoj pli kaj pli malfortiĝis, fariĝis mallaŭta murmuro, kaj mi falis en profundan dormon. Dum multaj tagoj mi restis malsana en la hospitalo, sed iom post iom, sub zorga flegado, mi regajnis mian antaŭan forton kaj kiam mi fine foriris de la hospitalo neniu povus diri ke mi estis

suferanta de longedaŭra febro.

Pri la klarigo de mia stranga monta aventuro tiuj kiuj scias la historion jam estas eldirintaj sian opinion. Ĉiuj klarigas la aferon same kiel faris la ĉefkuracisto. Kaj eble vi, kiu legas tiun ĉi rakonton, trovas la saman klarigon plej tenebla. Vi eble opinias ke la tuta afero estis simpla iluzio, kiu naskiĝis en la cerbo de malsana viro. Tamen, unu aferon nek vi, nek la kuracistoj, nek la flegistino povas klarigi. Kiam mi estis preta foriri el la hospitalo kaj oni redonis al mi miajn vestaĵojn mi trovis en unu el la poŝoj de mia vesto dekduon el la plej belegaj alkdentoj kiujn mi iam vidis.

PRI LA NOVA ARISTOKRATARO

De Roberto M. Bailey

Aristokrato estas persono kiu subtrahas de la rajtoj de aliaj homoj kaj adicias al siaj je sia bontrovo. La nova aristokrataro naskiĝis samtempe kun la aŭtomobilo. Ĉu li estas Napoleono de financo kiu per supera lerteco pasigas la monon de aliaj homoj el iliaj poŝoj en sian, kaj per malgranda parto da ĝi aĉetas grandegan aŭtomobilon, ĉu li estas modesta domposedanto kiu hipotekas sian domon por la prezo de pli malgranda aŭtomobilo, kaj poste meditas pri metodoj kaj rimedoj akiri gasolinon por nutri la saman, la posedanto de aŭtomobilo estas la grandsinjoro de la publikaj vojoj kaj de tiuj kies solaj vojaĝiloj estas tiuj kiujn ili heredis de Adamo.

Per impostoj eltiritaj el la senaŭtomobila urbano la stratoj estas rabotitaj kaj sablopaperitaj por ke la aŭtomobilisto trovu senĝenecon kaj komforton rajdante laŭ ili, kaj kiam la dirita impostita urbano plendas ke li ne povas uzi la vojojn tiel plibonigitajn je sia kosto pro timo renkonti malordan specon da morto, estas afable konigitaj al li ke ekzistas aliaj vojoj, malestimataj de la aŭtomobilo pro neperfektaĵoj, per kiuj li povus alveni nedismembrigite al sia celata loko.

Kelkefoje dum oni atendas okazon sendanĝere transiri straton liaj oreloj subite estas atakitaj per netera sono kiun dum minuto li imagas esti la dolorkrioj de speciale pekplena animo tordiganta sur la kornoj de forkego

super la plej varmega forno en la infero. Liaj haroj suprenleviĝas, se okaze li ne estas senhara, kaj furioze li ĉirkaŭrigardas por ke li metu la manojn sur la ofendanto kaj ŝiru lin membron de membro. Sed la racio fine reakiris la regadon, kaj li vidas ke li senrajte furioziĝis, ĉar estas nur juna aŭtomobilisto manlaboriganta la plej novan patentitan oreltimpanfrakasilon.

Aŭ similmaniere juna fraŭlino staras sur trotuaro ĵus post kiam stratŝpruciĝilo pasis, kaj dum ŝi atendas ŝancon sendifektite de la preterzumantaj veturiloj transiri ĝis la kontraŭa trotuaro ŝiaj makzeloj kviete maĉas la bonodoron ĉiklon, kaj ŝia imago teksas songojn ĉirkaŭ la junulo kiu vizitas ŝin la vesperon hieraŭan kunportanta skatolon de la plej bonaj ĉokoladoj de Glukozini. Subite aŭtomobilo preterpafiĝas proksime al la trotuarando, jetanta ekpluvegon el pulvorigita stratkoto sur la unupecan robon nur antaŭnelonge aĉetitan je kvar dolaroj kaj naŭdek ok cendoj ĉe terurega ofervendado. La veturigisto daŭrigas sian vojon kun la senmova vizaĝo de Buddha, nezorgante pri la ĉagrenoj de la komuna homamaso, dum la fraŭlino rigardas la difektitan ŝtofon malgaje sed submetiĝe, ĉar ŝi scias la privilegiojn de la nova aristokrataro.

Kelkefoje tiuj ĉi privilegioj estas malordigitaj de magistratoj kiuj, kvankam ili eble scias kiamaniere interrilati kun la ordinaraj homoj, estas riproĉinde malkleraj pri siaj devoj al la nova aristokrataro. Neniu pravpensanto mallaŭdus junulon kiu, tial ke li sentis en sia spirito la altan alvokon oferi siajn tutajn energiojn pro diferencigi la diversajn fabrikaĵojn de cigaredoj, ne trovis tempon por ankaŭ pristudi la fizikon de pezaj korpoj movantaj. Tamen okazoj estas konitaj kie tia junulo, estante ĉiam tre zorgplena neniam kurigi sian maŝinon pli ol ok mejlojn hore, estas monpunita kvin dolarojn de malmolkora juĝisto nur tial ke, defaliginta sescolan telefonan stangon, per sia aŭtomobilo, li nevole kuris trans la straton kaj frakasis platvitran fenestron valoritan je sepdek kvin dolaroj. Ĉiuj povas vidi la malpravecon. Ĉiuj devas konsenti ke ok mejloj hore, kiu estas la ĉiama rapideco de ĉiu aŭtomobilisto enkondukita en juĝejon, estas tre modera, kaj ke la aparta detruo kiu tiel ofte

akompanas tiun ĉi precizan rapidecon, povas esti aljuĝita nur al neevitebla malbonsanco. Kompreneble la sola deĉaĵo por magistrato kun prava koncepto de la rajtoj de la nova aristokrataro estas liberi tiajn nevolajn ofendantojn kaj lasi ilin ellerni per longedaŭra sperto kiamaniere eviti surmeti tiujn ĉi malfeliĉaĵojn sur la pli malaltajn klasojn.

Sed estas okazoj kiam la plej aristokrataj de aristokratoj ne povas ne riproĉi siajn kunaristokratojn. Kiam amasoj da geamikoj staras sur la strato atendante elektran veturilon kaj vive diskutante la portreton en la matena ĵurnalo de amikino kiu ĵus kuraĝis eniri la danĝerojn de la edzeca stato, oni certe devas mallaŭdi la senpensecon de homo kiu traplugas tra la feliĉa amaso, lasante dissemitan post li du vicojn da objektoj por la zorgoj de la ĥirurgo kaj la funebristo. Oni sentas ke eĉ lia senkulpigo, kio por eviti la katastrofon necesigus ke li malrapidigu sian maŝinon aŭ movigu el rekta linio, ne devus savi lin de monpuno de almenaŭ kvindek dolaroj. Kaj kiam veturigisto fariĝis tiel profunde dronita en medito ke li forgesas rigardi la vojon antaŭ si, kaj morte superkuris infaneton gaje ludantan sur la strato, ni apenaŭ mallaŭdos la malfeliĉan patrinon se ŝi sin sentas iom ĝenata per la okazjeto.

Kvankam tro multe da indulgo ne devus esti atendata por la senaŭtomobiluloj kiuj penas uzi la publikajn vojojn kiam la lastaj estas bezonataj de la aristokrataro, estas bedaŭrinda fakto ke la dirita aristokrataro ne estas tute sendanĝera inter si mem. Kiam homo ebriita per la entuziasmo de juneco aŭ per io alia, postulas la tutan vojon por vidigi al si mem kiom rapide li povas vojaĝi, kaj en la daŭro de sia elmontrado renversas aŭtomobilon aŭ du kviete kurantan antaŭen, la fakto ke li ĉe la fino estas sendita parabole tra la aero kontraŭ arbotrunko apenaŭ kompensas la postvivantojn post lia eksperimento, se tiaj estas. Malĝoje oni devas konfesi ke inter la aŭtomobila aristokrataro, kiel inter la pli malaltaj klasoj, estas tiuj kiujn la vulgarularo nomas angle "dam-phools." La konsolo estas ke tiuj ĉi en la daŭro de tempo estos eliminataj per siaj propraj maŝinoj, kun resulta pli alta mezkvanto da menseco en la homraso.

Ough!

When you find in learning English,
b-o-u-g-h is "bow,"
Then c-o-u-g-h, of course, you'd fancy
would be "cow,"
But no, when I pronounce it so, the
natives only scoff,
For "cow" is c-o-w, c-o-u-g-h is
"coff"!

Then if to "bough" you add a "t,"
you'd think it would make "bout";
But oh, no! Once again you'll find
you've got a little out.
It's "bought," and bout's another word
with quite a different spelling.
(Oh, dear! the muddle of it all upon
my brain is telling!).

Then t-o-u-g-h I try. I make a shot
with "toff"—
But no! Although I'm near the mark,
I'm still a little off.
For some mysterious reason t-o-u-g-h
is "tuff."
Though h-o-u-g-h, I find, is neither
"hoff" nor "huff."

But "hock!" Ah, me! How strange it
is! There seems nor rhyme nor
reason
To spell dock d-o-u-g-h is ortho-
graphic treason,
For d-o-u-g-h is never anything but
"dje."
Though t-h-r-o-u-g-h is neither
"throck" nor "throee."

It's "throo." Then s-o-u-g-h I boldly
try, but ugh!
A man who hails from north of Tweed
declares the word is "sooch"!
Pat Murphy hears the Scotchman's
word and slyly whispers "Och!"
And don't forget, y'r honour, l-o-u-g-h
is "loch."

Alas! how can a foreigner this awful
language pick up,
In which the prefix h-i-c transforms
"cough" to "hiccup."
English the universal speech! Nay,
nay, life's far too short
To waste o'er idiosyncrasies of such
prepost'rous sort!

Dr. J. Esslemont

in The British Esperantist.

WORDS WITH FALSE ANALOGIES
(Continued)

- Ili faris diboĉon en karuselo.
They had a carousal in a merry-go-round.
- Esplorante la kavernon, mi trafis profundan kavon.
In exploring the cave I came upon a deep pit.
- La dentisto, priborinte la kavon, ĝin plombis.
The dentist drilled out the cavity, then filled it.
- Mi komandis la 10an regimenton, kiam oni ricevis ordonon, ke la brigado iru al la fronto.
I was in command of the 10th regiment when orders came for the brigade to go to the front.
- Atendi tian sekvon estus konsekvenco.
To expect such a consequence would be the consistent thing.
- Kvankam ne povante la homojn regi, ni ilin kontrolis.
Tho unable to control the men, we kept tab on them.
- Volu kontroli tiun liston, dum mi ĝin legos al vi.
Please check off the list as I read it to you.
- Ne estas oportune, sed estus konvene, fari la pafsaluton.
It is not convenient, but it would be the appropriate thing to fire the salute.
- Mi amas lardon kaj ŝinkon, sed mi abominas ion kun porkgraso kuiritan.
I like bacon and ham, but I can't bear anything cooked in lard.
- Kvankam grandampleksa, la parcelo ne estas larĝa.
Tho large in area, the lot is not wide.
- Mi forlasis la liceon ne diplomiĝinte.
I left high school before graduation.
- La brilo de la lustroj lumigis gajan, multkoloran publikon.
The lustre of the chandeliers fell on a gay and motley crowd.
- La magazenoj vendis ĝis la noktomezo.
The stores were open till midnight.
- Mi havigos al vi la neton antaŭ sabato.
I'll have the final draft in your hands by Saturday.
- Mi pliamas la novelojn, ol la romanojn.
I like short stories better than novels.
- Kvankam proponinta al li monon, mi nenion oferis.
Tho I offered him money, I sacrificed nothing.
- Jena vortaro estas skribtabla oportunaĵo.
This dictionary is a handy desk companion.
- Li parolis emfaze, kun patoso, verve, sed ne kortuŝe.
He spoke with expression, with feeling, with animation, but without pathos.
- Mecenatoj pli praktike valoras, ol patronoj.
Moneyed patrons are of more practical value than patron saints.
- Estas longa pilgrimo kaj ni estas lacaj pilgrimantoj.
It is a long pilgrimage, and we are weary pilgrims.
- Sur mia telero estis abunda porcio da brasiko.
On my plate was a generous helping of cabbage.
- La armeo ricevas duon-porciojn.
The army is on half rations.
- Maldikaj porkoj donas malbonan porkaĵon.
Thin hogs make poor pork.

Abridged Catalog

Following is an abridged list of the books we have for sale. These books are on hand when this list is issued, and by always ordering from the latest list you will be fairly sure that your order can be filled as sent. Additions will be made to the list each month, until practically our full line is given, and those out of stock and not immediately obtainable will be deleted from the list. Remember, then—always order from the latest list.

All books Paper Covered unless otherwise specified.

PRICES INCLUDE POSTAGE

The following books, etc., are carried in stock in quantities and may usually be had without delay.

TEXT-BOOKS AND DICTIONARIES

Complete Grammar of Esperanto (Kellerman) Cloth	\$1.25
Practical Grammar of the International Language (Kellerman Reed)50
Esperanto Teacher (Fryer)20
Esperanto at a Glance (Privat)15
Primer of Esperanto (O'Connor)10
Introduction to Esperanto (Baker)05
English-Esperanto Pocket Dictionary (Harris)25
Esperanto-English Dictionary (Motteau)60
Esperanto-English Dictionary (Millidge)	1.50
Edinburgh English-Esperanto and Esperanto-English Dictionary50
Handy Pocket Vocabulary (O'Connor)10
Fundamento de Esperanto, Cloth75
First Reader (Lawrence)25
Kurso Tutmonda20
Tra la Jaro (all in Esperanto) (Waddy), Cloth50
Plena Vortaro (Esperanto-Esperanta-Franca) (Boirac), 2 Vols. and Supplement	2.50
Klasika Libro (Esperanto-English Vest Pocket Dictionary)25
Du Mil Novaj Vortoj50

LITERATURE

Cindrulino (Dumas) Stanyan15
Du Rakontoj25
Karlo (Privat)15
Kial Mi Scias ke la Mortintoj Revenas (Stead) Goodhue—new45
Kolomba Premio (Dumas) Papot10
Mallonga Biografio de Henry Fawcett (Holt) Weems25
La Mopso de Lia Onklo10
The New Testament in Esperanto Cloth, gilt edges45
Patroj kaj Filoj (Turgenev) Kabe65
Pola Antologio, Kabe50
Princo Serebrjanij (Tolstoj)75
Princo Vanc' (Bates) Harris35
Cloth, gold-stamped75
Rakonto kaj Aventuro (Hall & Barroll)10
Robinsono Kruso (Defoe) Mason, Boards50
Sep Ridoj (Wendell)25
Sub la Meznokta Suno (Wendell)25
Tradukoj Tri (Helliwell) Helliwell20
La Virineto de la Maro (Andersen) Zamenhof35
Dua Kreanto (Sanjurjo)05
Elektitaj Fabloj (La Fontaine) Vaillant15
Eneido (Virgil) Vallienne80

Patrino Anserino (Stoner)15
Tra l' Silento (Privat)40
Verdaj Fajreroj (Frenkel)20
Versajetoj (Bishop)—new25

COMEDY AND DRAMA

Don Juan (Moliere) Boirac40
Frenezo (Pujula)30
Ginevra (Privat)25
Ĝis la Revido05
Kiel Plaĉas al Vi (Shakespeare) Kellerman25
Mistero de Doloro (Gaul) Pujula50
Misteroj de Amo (Kolavrat)30
La Rompantoj (Pujula)25

MISCELLANEOUS

Aĉo—card game50
Gvidlibro tra San Francisko05
Historio kaj Teorio de Ido35
Kondukanto al la Stacia Pilkludo (Spaulding) Erik10
Matematika Terminaro25
Mia Nuna Sintenado pri Apendicito (Morris) Besemer10
Vidindaĵoj de Bostono15
Komerca Sekretario15

PROPAGANDA

Amerika Esperantisto, in lots of 5 or more, per copy05
Esperanto Keys, each02
20 for25
100 for	1.00
Peace Stamps, 24 for15
144 for60
288 for	1.00
"E" Button or Brooch Pin, Green Enamel Star with Gold Plated Back—letter "E" in Gold35
E. A. N. A. Button05

The following are in stock when this list is printed, but supplies are very uncertain and in many cases when the present stock is sold we shall be unable to obtain more. It would be well, therefore, in ordering any of these, to specify second choice.

LITERATURE

Abatejo de Westminster10
Aladin aŭ La Mirinda Lampo20
Ali Baba kaj la 40 Rabistoj15
Aline50
La Bruna Lilio06
Brazilio40

Bukedo50
La Devo10
Deziro de la Diakono.....	.10
En Malliberejo.....	.10
En Rusujo per Esperanto.....	.20
Eĉ en Doloro ni estu Ĝojaj.....	.25
Eĥoj el Manila.....	.50
Diversaĵoj40
Eliro60
La Faraono, 3 Vols., each.....	.70
Historio de Esperanta Movado en Saratov	.10
La Kamena Angulo.....	.25
Karmen35
Kondukanto kaj Antologio.....	.50
Laŭroj50
Levidoj50
Inter Blinduloj25
Mirinda Amo75
Mondologio20
Nova Sento60
La Predikanto25
Rikke-Tikke-Tak50
Rip Van Vinkl.....	.25
Tatterley, Cloth55
La Reĝo Judea.....	.50
Kie Estas la Eklezio de Kristo? Cloth..	.50
Rakontoj pri Feinoj.....	.25

COMEDY AND DRAMA

La Amkonkurantoj10
Advokato Patelin20
Angla Lingvo sen Profesoro.....	.30
Aspazio60
Bardell kontraŭ Pickwick.....	.10
Georgo Dandin35
Halka30
Ifigenio en Taŭrido.....	.55
Jolanto45
Kaatje75
La Rabistoj55
Mazepa50
La Revizoro40
La Ventego, Cloth.....	.50

MISCELLANEOUS

Medallion Pin, Portrait of Dr. Zamenhof,—only a few of these on hand and no more obtainable..... .25

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje: 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

S-ro Jakov Vodanoviĉ, G. P. O., Auckland, New Zealand. (Il. PK). 8

New York, N.Y.—Armand B. Coigne, 2633 Creston Avenue, Usono. Korespondos nur letere rilate psikologio, psikaj-malsanoj, psikismo kaj supozeble post-mortaj fenomenoj kun studentoj, kuracistoj kaj interesitoj. PM kaj PK kolektantoj ne ricevos respondon.

S-ro. R. Sundvall, 1909 River St. McKeesport, Pa., Usono. nur kun fremduloj.

S-ro Nikolas Murray, 712 Dearborn St., Chicago, Ills., Usono, desiras korespondadi PI.

S-ro Juli Llavia, Placa de la Creu, 3 Palafrugell; La membroj de Esperantista Klubo Palma, str. Mision, 5, 1.er. desiras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, precipe pri hemio.

S-ro Luis Santacana, Carretera, 71 Molins de Rey, Barcelona.

S-ro Michel Perich, P. Meridiana, 115, Barcelona.

S-ro Pere Navas, str. Cano, 58, ent.o, Barcelona.

S-ro Josep Guixa, str. Santa Catarina, 50, 3er, Barcelona.

STRANGA IDILIO

ARLO BATES and HERBERT HARRIS

25c.

On sale by British Esperanto Association, London and Herbert Harris, Hyde Park Hotel, Chicago.

MIGRANTAJ KARTOJ ! ! !

6 FOR 10 cts. 25 FOR 25 cts.

E. H. BECKER

332 Third Ave., Dayton, Ky.

INVESTIGATE SINGLE TAX

"The Single Tax: What It Is." Henry George
 "The Single Tax and the Farmer." Shearman
 "The Single Tax and the Businessman." Rusby
 All three booklets and the Public, the paper with the Single Tax point of view, 10 weeks 25c.
 THE PUBLIC, 122 East 37th Street, New York



La Emerson-a "Grand"

Stilo B—Kvin futojn, ok kolorojn

Tiu ĉi mirinda Emerson-a "Grand" Fortepiano posedas la riĉan kaj sonorajn karakterojn de "Concert Grand."

Ĝi ne estas tro granda por ordinara muzik-ĉambro, kaj spite tion pri tonamplekso ĝi sufiĉas por bezonoj de koncert-ĉambrego.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj

Petu Katalogon

EMERSON PIANO COMPANY

Boston, Mass.

(Fondita 1849)